## Neĝam Mohamed

La 23. januaro granda malfeliĉo falis sur la alĝeran esperantistaron. Informo venis al ni, ke nia peranto K-do Neĝam Mohamed estas trafita de la morto. Efektive, malsana depost la 25. decembro 1928, li subite mortis posttagmeze post kafotrinko. Tio malĝojigas la tutan liberpensularon, komunistaron kaj



SAT-anaron, ĉar li havis grandan simpation por tiuj movadoj.

Malgraŭ sia origino de sankta familio, kiu posteulas de la profeto Mohamed, Neĝam[1] Mohamed forĵetis ĉiun religian stultaĵon: li estis unu el la tre malmultaj arabaj liberpensuloj. Dum la “Kamadam[2]“ li manĝis malgraŭ la malkontento de siaj proksimuloj; post sia reveno de la Göteborga Kongreso li tute forĵetis la “Seŝia“-n[3] kaj definitive elektis la eŭropan ĉapelon. Liaj moroj diferencis de la arabaj: li estis unu el la adeptoj de l' progreso kaj de la lukto kontraŭ la religiemo.

Li ankaŭ devenis de riĉaj gepatroj vendataj al franca imperialismo. Malgraŭ tio li havis revoluciajn sentojn: li sincere malamis Francion, kiu sklavigis siajn samrasanojn. Li akiris tiujn revoluciemajn opiniojn post eliro de la lernejo, kiam, laboristo, li estis senhonte ekspluatata, pli ol la eŭropanoj. Pro tio li aliĝis la komunistan junularon kaj dum pluraj jaroj, ĝis longa malsaneco, kiu trafis lin en 1927, li senlace sindonis al efektiviĝo de l' komunismo inter la araboj. Ĉiuvespere kunveno, kunsido, afiŝgluado okupis lin, sed bedaŭrinde la malbona farto devigis lin ĉesigi tutan aktivecon.

Li turnis siajn okulojn al nova idealo, kaj en fino de 1926, post apero de propagandaj artikoloj en laborista gazeto, li estis la sola organizita alĝera laboristo, kiu komprenis la nepran neceson kaj utilon de esperanto. Li estis la unua araba esperantisto. Rapide li lernis la lingvon kaj de tiu momento dediĉis ĉiujn siajn momentojn por esperanto. Dank' al li, kurso gvidita de lia instruanto, malfermiĝis en Alĝero kaj sekvintan jaron 10 novaj esperantistoj aliĝis al SAT. Ĉar li komprenis, ke sen kuna agado la internacia lingvo ne disvastiĝos, la 1. aprilo 1928 li kreis la grupon “Ĉiam Antaŭen“, kies unuan datrevenon li malfeliĉe ne vidis. Nomita sekretario, li senlace propagandis kaj, malgraŭ sia malbona farto, de novembro 1928 li gvidis 3 vesperajn kursojn semajne, ĉe kiuj partoprenis 25 lernantoj.

Ĉiuj, kiuj konatiĝis nian mortintan K-don Neĝam Mohamed, estas certe konvinkitaj pri lia granda fervoro kaj laboremo por nia lingvo kaj ankaŭ ekŝatis lian bonhumoron kaj afablecon. La alĝera esperantistaro neniam forgesos pri sia fervora, plej inda K-do.

Ĉiam Antaŭen.

[1] Signifas: astronomo.
[2] Araba granda fasto, kiu daŭras 1 mon.
[3] Araba ruĝa ĉapelo.

---

## TRA LA MOVADO
(Kroniko)

**BELGIO. Antverpeno.** Fondiĝis Marista Grupo Internacia. Celo: disvastigi esp-on ĉe maristaro. Membroj ekskluzive alilandaj, sed neniu flandro. La grupo ne havas regulajn kunvenojn, ĉar plej multaj anoj vojaĝas multe surmare. Por renkonti esp. maristojn, oni demandu pri ili ĉe: 20, Ankerrui, Zeemanshuis. La loka esp. lab. movado bedaŭrinde estas tre malvigla, kio malbonefike impresas niajn varbitojn k varbotojn. (Huszonkilences.) **FRANCIO.** La IX. kongreso de “Fédération Espérantiste Ouvrière“ (LEA por franclingvaj regionoj) okazos dum pasko en Saint-Etienne. Tiuokaze la loka grupo aranĝos 30. marto propagandan vesperfeston. Salutleterojn oni adresu al: Laborista Esp. Grupo, Bourse du Travail, Cours Victor-Hugo, Saint-Etienne (Loire), Francio. Liberpensula departementa kongreso okazinta 27. 1. en Sète akceptis rezolucion kun enhavo, ke “la grupoj liberpensulaj faru intensan propagandon favore al esp-o, lingvo internacia, kiu plifaciligos la interproksimiĝon de l' popoloj k forigos la limojn.“ **GERMANIO. Dresden.** La distrikto de LEA “Dresdena Industriregiono“ okazigis sian jarkonferencon 17. 2. en Zschachwitz ap. Dresden. Ĉeestis 55 delegitoj k gastoj. Parole salutis komunumestro de Zschachwitz k reprezent. de Kom. k Socdem. partioj, Lab. Radio-Asocio, distr. Dresden k asociestro K-do Hempel, Leipzig. La raporto de la administracio atestis pri kresko de nia movado. En jan. 1925 fondiĝis la distrikto kun 5 grupoj k havis proks. 100 membrojn. La distrikto nun nombras 17 grupojn kun pli ol 300 membroj. Se ĉiuj SAT-membroj respektas la kongresrezolucion, la membrostato estus pli ol 400. Por pli bone progresigi la movadon, oni ĉi jare aranĝos instruantokursojn. La konfer. pledis por multnombra vizito al la 9-a SAT-kongreso. Venonta distrikt-renkontiĝo okazos en majo en Demitz-Thumitz kun sabata varbvespero k dimanĉa konferenco, en kiu oni denove traktos la temon “LEA k SAT“. Kiel distriktestro estas novelektita K-do Köckeritz (77), Dresden. — **Hamburg.** Laŭ jarraporto en “Akvobordano“ la LEA-grupo nombras 70 anojn; inter ili estas 24 SAT-anoj, sed nur 10 abonantoj al “S-ulo“. Okazis flugfolia propagando k invitoj aranĝi kursojn ĉe div. proletaj organizoj kun negativa rezulto. La gvidantoj de l' organizoj ne emas esp-igi siajn membrojn. Ekzemplo: Gvidanto de ruĝfrontbatalantoj, kiu tre favore parolis pri esp-o, demandite, ĉu ne estus konvene aranĝi kurson por la anoj, patose diris: “Ne! por tio niaj membroj ne havas tempon!“ La lab. gazetoj nun regule publikigas niajn monatprogramojn. La kursoj aranĝitaj ĝenerale havis ne tre kontentigajn rezultojn. La infankursoj tute fiaskis pro nekonvena tempo k manko de intereso. Kurso en Eimsbüttel ĉe popolhejm-junularo bone sukcesas. Okazis perfektiga kurso, en kiu partoprenis nur tro malmultaj membroj. La grupkunvenoj mem estis vizitataj meze de 18—25 membroj. Per anonco en “S-ulo“ la korespondado plivigliĝis. Kelkaj eksterlandaj K-doj vizitis la grupon. — **München.** Fondiĝis 6. 2. Junulara rondo de LEA kun 15 Gek-doj. Ĉiumonate grupvespero kun parolado, kantado ktp. k dimanĉaj ekskursoj. 5 anoj estas membroj de SAT. **PORTUGALIO.** K-do Rob. das Neves (12 448) faris en “Universitato Libera de Koimbra“ paroladon pri esp-o, kiu estis aŭskultata de multaj intelektuloj. Kuraĝigite de la bona sukceso, li malfermis kurson, kiun partoprenas ĉefe studentoj, sed ankaŭ laboristoj. Ĝis nun la portugala studentaro tute ne interesiĝis pri esp-o. K-do 12 448 estas la sola esp. studento en la Koimbra universitato. **SOVETIO. Kohma.** 26. 1. la grupo ludis esp. spektaklon: “Oni veron ne mortigos“ k “Venko“ en ejo de Centra Urba Teatro je nomo Semenĉikov. 2. febr. organiziĝis esp. rondeto en 7-jara lernejo, ĉe kiu enskribiĝis pli ol 40 gelern. k geinstruistoj. Gvidas A. Zabojen. **Leningrad.** De 14.—17. 2. okazis distr. konfer. de lab. kor-oj. SEU-organizo ĝin aktive partoprenis. En Domo de Gazetaro estis speciala ekspozicio de Intern. Kunligo organizita de SEU. En speciala eldono “Labkor-o sur tribuno“ estis materialo donita de esp-istoj. Rezolucio pri esp-o akceptita similas al tiu siatempe akceptita en Moskvo. La peresp-a interliga laboro estu gvidata de la gaz. “Leningrada Vero“. Sekve la gazetaro nun devos helpi disvolvi nian movadon. (9310.) **Ulala** (Ojrotio, Siberio). Rondeto de poŝtoficistoj. 15 pers.

---

## NEKROLOGO

Mortis subite fervora esperantisto,

**Dionizio Klaĝin,**

Li aniĝis al SAT kiel la unua (168) en N.-Jorko, sed restis gvidanto de neŭtrala grupo “Harmonio“, kies tre aktiva instruanto li ankaŭ estis. “Harmonio“ aranĝis multajn festenojn, t. n. “barĉoj“-n, kies sperta organizanto estis Klaĝin. Dum tia barĉo, la 16-an de febr., trafis lin dancantan apopleksio de la koro, kiu forrabis lin por ĉiam el la rondoj amikaj.

Esperanto perdis treege aktivan varbemulon, SAT unu el la plej unuaj anoj, kiu levis ĝian standardon. La standardportinto falis, sed ni ĝin alten tenados k flirtigos super la detruendaj landlimoj, pri kies disrompo la mortinto revis.

Respektoplene ni rememoros pri ĉiuj liaj bonaj ecoj.

Funebre komunikas al la SAT-anaro la

**Nov-Jorka Grupo “Esperantista Proletaro“.**

## ĈE LA NEŬTRALULOJ

En aŭg. 1928 la ministerio de publika klerigado en Polio permesis la instruadon de esp-o kiel nedeviga lernobjekto en la lernejoj. Praktike efektivigata estis tiu ĉi decido en la Bjalistoka distrikto, kie la instruistaro, ne atendante sian propran finstudadon, komencis organizi kursojn en popolaj lernejoj. Esperanto estas nun instruata en 18 Bjalistok-regionaj regnaj lernejoj k en regna gimnazio en Grajevo.

Pola sciencisto k politikisto F. A. Ossendovski, konata pro sia verko “Bestoj, homoj